

Grésillon

Claude Gacond, 387-a radioprelego, 1971.03.10 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

De sinjoro B. Cheverry en Angers, Francio, ni ricevis tre afablan leteron kaj informojn pri la Esperantista Kulturdomo Kastelo Grésillon. Tiujn informojn, kiuj estas verkitaj laŭ formo de intervjueto, ni legas al vi, instigante vin viziti tiun centron, kiu disradiigas la esperanto-kulturon.

A.- Kion celas tiu kulturdomo kaj de kiam ĝi funkcias ?

Cl.- Fine de 1951, sub la impulso de sinjoro Micard, instruisto kaj fervora esperantisto, estis kreita la kooperativa societo **Kulturdomo de la francaj esperantistoj**. La entrepreno aspektis al multaj kiel io hazarda. Unue ĝi devis frunti al aĉeto de domo en kiu, dum la ferioj, esperantistoj el la tuta mondo povu kunvivi kaj kunveni por sekvi kursojn, prelegojn, distriĝi. La celo estis montri, je malgranda skalo, kiel povus esti mondo sen lingvaj baroj. Hazarda la entrepreno estis, ĉar la iniciintoj ne povis kalkuli pri ekstera financa helpado. Ili alvokis al la individuaj esperantistaj kaso plej ofte tre modestaj. Tamen optimismo, konfido, sindonemo kondukis al sukceso. Montriĝis ebleco ne nur aĉeti domon, sed kastelon staranta meze de parko deksephektara je amplekso kaj situanta en la franca regiono Anjou (Anĵu), en la departemento Maine-et-Loire (Meneluar), regiono tre turisma.

A.- Ĉu tiu kastelo estis tuj preta por roli kiel kulturdomo ?

Cl.- De la oficiala inaŭguro okazinta en 1952, multaj aranĝoj celis la modernigon de la interno kaj ekstero. Krom la loĝejo, la gastoj havas je sia dispoŝo naĝejon, golfejon, retpilkan ludejon, infanludejon, lageton, herbejojn kaj arbaretojn, kie ili povas promeni aŭ ripozi. Interne de la kastelo ili trovas por sia distrado tablotenison, fortepianon, diskotekon, bibliotekon kaj multe da loko por la interbabilado.

A.- Kiom da vizitantoj vi akceptas ?

Cl.- Ĉiujare la nombro de niaj gastoj kreskas. Dum la monato aŭgusto ĝi ofte superas la centon. De la malfermo de la kastelo ĝis nun pli ol okmil personoj el plej diversaj landoj jam restadis en Grésillon.

A.- Unuavide tio ne ŝajnas eksterordinara, ĉar nun la homoj multe vojaĝas.

Cl.- Tute prave. Sed kion serĉas la gastoj de Grésillon, tio estas pli ol nuraj turismaj allogaĵoj, pli ol hotela vivo. La gastoj venas en Grésillon por konatiĝi kun personoj divers-devenaj. Venantaj ĉefe el la sama lingva komunumo, ili esperas havi kontaktojn kun homoj apartenantaj al aliaj medioj, ĉu membroj de aliaj societoj, adeptoj de aliaj filozofiaj aŭ religiaj kredoj.

A.- Ĉu la kastelo estas malfermita dum la tuta jaro ?

Cl.- Ne, la Kulturdomo Grésillon malfermas siajn pordojn nur por la paskaj kaj someraj ferioj. Tiam diversgradaj kursoj permesas lerni esperanton, praktiki tiun lingvon kaj perfektigi. Ankaŭ okazas superaj kursoj por tiuj, kiuj deziras instrui esperanton. La diplomoj akiritaj en Grésillon estas aŭtentigitaj de la Franca Instituto por Esperanto. Apud tiuj kursoj prelegojn prezentas specialistoj el diversaj landoj. Ankaŭ komunaj vizitoj al noktaj son- kaj lum-spektakloj estas organizitaj. Estas multaj belegaj kasteloj por viziti en tiu belega regiono, kaj plurfoje okazas tuttagaj ekskursoj. Plie la kulturdomo proponas teknikajn kursojn por amatoroj pri bind-arto, korbfarado kaj emajlado.

A.- Ŝajnas, ke tiu eksperimento starigi kulturan centron estas sukcesa.

Grésillon

Claude Gacond, 387-a radioprelego, 1971.03.10 & 13

Cl.- Almenaŭ ĉiuj forlasas la kastelon Grésillon pli riĉaj je amikecoj kaj novaj spertoj. Multaj personoj malkovras en Grésillon, kio estas internacia vivo sen tradukmalhelpoj. Kaj tio daŭras de baldaŭ dudek jaroj. Tutcerte estas sukceso.

A.- Ĉu vi estis kontentaj pri la sezono 1970-a ?

Cl.- Al tiu demando sinjoro Cheverry alportas tiujn informojn : Jes, ni estis kontentaj. La jaroj sin sekvas sen tute simili unu la aliajn. Ne ĉiam estas la sama ekvilibro inter ĉiuj someraj periodoj. Pasintjare la juliaj periodoj estis iomete pli vizitataj ol dum la antaŭaj jaroj, sed en aŭgusto la nombro de la gastoj estis iomete pli malalta ol en 1969. Tamen ĝi ĉiam superis la centon. Do entute, laŭ vidpunkto de partoprenado, la somero estis kontentinda. Ankaŭ laŭ kultura vidpunkto. Nur oni povis bedaŭri, ke la suno ofte paŭzis kaj tro ŝpare sendis siajn radiojn.

A.- Konklude al tiu intervjuo informado ni menciuj, ke la gvidantoj de tiu esperanto-kastelo pretigis verdan informilon pri la venontaj aranĝoj. Jen kio estas antaŭvidita por la venontaj paskaj kaj someraj ferioj :

Cl.- La 1-a restado, kiu okazos de la 4-a ĝis la 9-a de aprilo, estas organizita de UFE, tio estas de *Union française pour l'espéranto*. Ĝi nomiĝas Dekaj Kultura Semajno.

A.- Tuj poste sekvas studsemajno kun kursoj, aplikado de esperanto kaj distraĵoj.

Cl.- La somero estas dividita en periodoj. La unua, kiu okazas de la 4-a de julio kaj finiĝas je la 25-a de julio estas titolita Kulturaj Esperantistaj Semajnoj.

A.- Poste de la 25-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto okazos Kulturaj kaj Turismaj Ferioj kun prelegoj kaj ekskursoj.

Cl.- De la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto okazos Postkongreso de SAT kaj de la 15-a de aŭgusto ĝis la 4-a de septembro ree estos organizitaj studsemajnoj kun plej diversaj kursoj.

A.- Ni deziras al ĉiuj tiuj aranĝoj plej grandan sukceson kaj al la Kastelo Grésillon mem tre longan vivon kun ĉiam pli da manifestacioj esperantistaj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-